

Volume 2, Number 2

Fall / Aŭtuno 2005

Verdaj Folioj

The Newsletter of the Esperanto Society of New England (ESNE)
La Bulteno de la Esperanto Societo de Nov-Anglio (ESNA)

<http://www.esne.net>

Nia kara Okemo en nova loko!




Aŭtuna Renkontiĝo de E-o
8a - 10a de oktobro 2005
Silver Bay, Lake George, NY



The Esperanto Society of New England is an umbrella organization dedicated to supporting the development of local chapters of Esperanto speakers in Connecticut, Maine, Massachusetts, New Hampshire, Rhode Island, and Vermont.

Prezidanto	Dr. Steven D. Brewer	(413) 545-2272 sbrewer (ĉe) bio (punkto) umass (punkto) edu 5 Fairfield Street, Amherst, MA 01002-1303
Vic-Prezidanto	<i>Vacant</i>	
Kasisto	Bob Lidral	(508) 481-1742 lidral (ĉe) alum (punkto) mit (punkto) edu 56 Lakeshore Drive, Marlborough, MA 01752-4209
Koresponda Sekretario	Bill Harris	(207) 774-6695 wb_harris (ĉe) hotmail (punkto) com 4 Edgecomb Court, Portland, ME 04103
Eduka Sekretario	Sally Lawton	(413) 527-3579 slaw-o (ĉe) crocker (punkto) com 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027
Redaktoro	Jacob Schwartz	(781) 209-1918 quark (ĉe) alum (punkto) mit (punkto) edu 42 Dexter Street, Waltham, MA 02453

Join our mailing list <<http://groups.yahoo.com/group/esna>>
Visit our website <www.esne.net>



Upcoming Events

Oct 8th – ARE Reception
Silver Bay
YMCA Conference Center
Lake George, NY

Dec 17th – Zamenhof
Banquet
4pm · Location TBA
Amherst, MA

Prelego de la Prezidanto

La prezidanto de ESNA, D-ro Steven Brewer, deklamis la jenajn vortojn dum akcepto de ESNA ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Brattleboro, VT, la 10-an de julio.

Estimataj instruistoj, diligentaj kunordigantoj, bonkoraj studentoj, kuraĝaj komencantoj kaj miaj karaj gesinjoroj de la Esperanto Societo de Nov-Anglio. Mi deziras al vi ĉiuj bonvenon al la dua jara akcepto de la Esperanto Societo de Nov-Anglio por la Nord-Amerika Somera Kursaro. Nome de la Societo, mi volas esprimi ke ni tre ĝojas ke vi estas ĉi tie por studi Esperanton – la internacia lingvo.

Lastatempe, mi vidis la retpaĝaron "Learn Not to Speak Esperanto" (Lernu Kiel Ne Paroli Esperanton). Ĝi estis konstruita de Justin B. Rye kiu preskribas – iom amuzece – kiel kaj kial oni ne lernu Esperanton. Detale, ĝi esprimas, laŭ la opinioj de la aŭtoro, kial Esperanto estas malbonega internacia lingvo: la vortostoko estas maljusta, kaj ĝi ne vere estas fonetika, kaj tiu ĉi afero estas terura, kaj tiu alia estas fuŝa. Ĝi adade daŭras. Sed mi kredas, kaj verŝajne ankaŭ vi kredas, ke tiu vidpunkto tute mistrafas kio estas Esperanto: Esperanto estas ne nur lingvo – ĝi estas ideo, sperto, komunumo, kaj persona elekto je certa momento. Plej grave, ĉiu kiu lernas ĝin eltrovas ke Esperanto vere funkcias.

Esperantistoj nomas unu la aliajn "Samideanoj" por vera kialo. Zamenhof ne estis la unua kiu havis la ideon ke komuna lingvo povus konstrui pontojn inter la popoloj de la mondo. Ĉiuj Esperanto-parolantoj verŝajne scias ke Volapükon oni konstruis unue kaj multaj scias pri Solresol, la lingvo konstruita el muzikaj notoj, kiun oni povas kanti aŭ ludi per instrumentoj. La ideo estas bela, ke la homoj de la mondo povus ekhavi komunan lingvon kiu ne favoras unu popolon pli ol alian. Tiu senco de egaleco kaj partoprenado estas vera, kaj okazas pere de Esperanto ĉiutage.

Sed Esperanto ne estas nur ideo. Esperanto ankaŭ estas sperto. Mi kredas ke multaj Esperanto-parolantoj povas atesti je tri aŭ kvar fundamentaj spertoj kiuj okazas al oni dum lerni Esperanton. La unua okazas kiam oni havas la unuan konversacion. Mi lernis Esperanton sole, per libro. Kiam mi translokiĝis al nova urbo, mi eksciis ke estas loka grupo. Kiam mi venis al la unua kunveno, mi partoprenis mian unuan konversacion kaj ĝi estis mirinda sperto: Mi povis kompreni, mi povis paroli, mi povis komprenigi. Mi lernis fremdan lingvon en la

mezlernejo kaj altlernejo, sed tio ĉi estis malsama – estis speciala, estis vere magia momento por mi. La dua sperto okazas kiam vi unuafoje renkontas komencanton kiu studas Esperanton nur dum monato kaj jam ili povas kompreni kaj paroli la lingvon. Estis mirinde kiam vi vidas ties vizaĝon kaj komprenas ke tiu havas la saman sperton kiun vi havis – kaj vi scias ke ne estas nur vi. Alia okazas kiam vi havas veran internacian interŝanĝon: kiam vi iras al kunveno kiu havas homojn de 10 aŭ 15 malsamaj landoj kiuj havas nenian alian komunan lingvon kaj kiu simple kaj facile konversacias. La fina sperto estas partopreni la Universalan Kongreson. Mi ankoraŭ ne faris tion, sed kiam mi parolas al homoj kiuj tion faris, ili ĉiam parolas pri kiam ili vidas, por unua fojo, miloj da esperantistoj, sub la sama tegmento kaj senti ke oni estas vera parto de la Esperanta komunumo – estas tre impona spektaklo.

Estas tiu senco de komunumo – la rondo familia – kiu ligas nin unu al la alia. Sed la komunumo ne okazas nur ĉe la granda kongresoj. Ĝi ankaŭ okazas ĉe la lokaj grupoj. Estas la semajnaj kunvenoj ĉe la biblioteko kaj kafejo, kie najbaroj povas babili kaj kune studi kaj paroli pri siaj lastaj Esperanto-spertoj kiuj donas valoron al la lingvo lernado.

Justin Rye diras ke oni ne elektu lerni Esperanton, sed li ne proponas aliajn elektojn. Je ĉiu punkto de tempo, vi trovos homojn, kiu kredas ke neŭtrala kumuna lingvo estas bona ideo. Kaj, kiam oni kontrolas la elektojn, Esperanto ŝajnas la plej bona. Kiel Winston Churchill diris. "Demokratio estas la plej malbona formo de registaro, krom ĉiuj aliaj provitaj." Esperanto havas malperfektaĵojn, sed ĝi funkcias. Kaj iu, kiu provas ĝin nur iomete eltrovas ke ĝi funkcias.

Kaj mi scias kiel aspektas la alian flankon de la monero. Mi studis la hispanan dum 10 jaroj, en la altlernejo kaj kiel bakalaŭra studento. Mi studis dum semestro alilande. Mi scias kia estas klopodi esprimi sin en dua lingvo kun homoj kiuj estas denaskaj parolantoj. Kaj mi scias kiel homoj respondas. Pravas ke estas kelkaj kiuj estas tre afablaj, sed la plejmulto ne estas. Oni mokis min kaj ridis pri mi kaj ŝercis pri miaj eraroj kiuj estas kompreneblaj por denaskaj parolantoj. Kiel mi divenu ke kiam oni diras "Mi esperas ke vi ĝuu vin" al paro da virinoj ironitaj al festo, ke tio havus seksan signifon?

Ni ĉiuj aŭdis ke se iu estas farinda, indas fari ĝin bone. Sed ankaŭ estas vere ke se iu estas farinda, indas fari ĝin eĉ malbone. Esperanto ne estas perfekta, sed por mi, estas farinda -- eĉ malbone.

Dr. Steven Brewer

100 Esperantists in Austin

de Bill Harris

The 53rd ELNA Annual Convention was a great success this year! The local Esperantists in Austin, Texas, did an outstanding job in organizing and arranging the convention at Concordia University. There were over 100 Esperantists at the convention, including visitors from Brazil, China, Iran, Japan, Canada, Colombia, and Poland. Unfortunately, Esperantists from Africa and Bulgaria could not get visas, and so did not come.



Edwin de Kock, the well-known poet, was the Guest of Honor and presented several of his poems. Ursula & Giuseppe Grattapaglia, the founders of Bona Espero in Brazil showed a film about their activities there. Steve Brewer (ESNE president) led a group that wrote haiku-poems – see the results on the convention website at <http://kongreso.hewgill.com/poezio.html#hajkoj>

There were 5 Esperanto courses taught during the convention. One class had (at a guess) 40 students. Dorothy Holland set up the U.S. Testing Service during the convention, so any attendee could take an exam and receive a diploma. For more about the testing service, see <http://www.tejo.org/aaie/html/ekzamenoj.htm>

Scott Redd recorded much of the program and made it available in MP3 format at <http://ek2005.retservilo.com/>

Here are quotes from two other members of ESNE who attended:

Arnold Langberg-

Mi ege ĝuis la kongreson pro la sekvantaj kialoj en gravordo:

1. Mi pasigis tri tagojn dum kiuj mi aŭdis kaj parolis preskaŭ nur la Esperantan.
2. La du prelegoj de Duncan Charters. Laŭ mi li parolas la plej belan Esperanton kiun mi ĝis nun aŭdis.
3. La prelegoj pri "Vikipedio". Mi ne sciis ke Vikipedio havis Eperantan sekcion.

4. La ekskuro vidi la eliron de pli ol miliono da vespertoj de la malsupro de ponto dum pli ol 15 minutoj. Ĝi estis mirinda kaj impona vido.
5. Fine, mi aprezis la planadon kaj prizorgon faritajn de la aŭstinaj Esperantistoj.

Karen Klahr

As I am not much interested in literature, for me the opportunity for conversing was perhaps the most important thing. It was great to finally meet Esperantists to whom I had spoken and emailed. Great to see and hear the famous ones. Great to start friendships with new ones. It took a good bit of the weekend, and even reading the guidebook after I got home to figure out who's who. I spoke to people and then found out later what their accomplishments were. (Like Scott Redd and radioarkivo.org) I enjoyed hearing Duncan Charters speak and getting his info. I enjoyed the excursions, to see the *vespertoj* and the *trinkejoj*.



Nova Esperantistino!

Dave Coffin informis nin:

Lena naskis nian unuan infanon, Ginger Jane Coffin, en Bostono 13an septembron je 18:05. Patrino kaj bebo fartas normale. Supozeble Ginger parolos tri lingvojn "denaske", sed nun ŝi preferas suĉi kaj dormi. 8-)

Gratulojn al ĉiuj tri!

Bonan Ago-Tagon

**Por Pli Bona Mondo Pere De Esperanto
Sabate, la 1-an de oktobro**

Vi certe ne bezonas mian memorigon por informi pri Esperanto okaze de la Ago-Tago, sed mi ĉiam volonte memorigas vin pri ĉi tiu tago, ĉar mi mem kun la grupanoj de mia eta loka grupo ĉiam partoprenas ĉi tiun komunan feston de la parolantoj de Esperanto.

La Ago-tago estas de longa tempo la tradicia tago, en kiu lokaj grupoj kaj landaj asocioj tra la mondo aranĝas informajn eventojn celantajn la kuncivitanojn kaj laŭeble la gazetaron kaj la ceterajn inform-rimedojn.

Mi volas doni al vi nur unu ideon uzeblan dum la ĉi-jara Ago-Tago: Esperanto estas ilo por konservi la kulturen diversecon en la mondo. Pri la graveco de la plutenado de kultura diverseco konsentis ĉiuj landoj en la mondo, kiuj aprobis la dokumenton de Unesko pri tio. Pri tiu sama temo ankaŭ la ĉi-jara Ĝenerala Konferenco de Unesko okupiĝas, ĉar tamen kelkaj homoj, instancoj, landoj volas antaŭenigi la malan principon: kulturo kaj lingvoj ankaŭ estas varo, kaj oni traktu ilin kiel varojn.

Esperanto, ĉiukaze, ne celas preni la lokon de lokaj kaj naciaj lingvoj, sed ĝi helpas por teni ilin vivantaj kaj bonfartaj.

Do, kaj se vi vivas kiel mi en malgranda urbo aŭ vilaĝo kaj havas la bonan ŝancon senpere renkonti verajn vivantajn, kaj se vi vivas en urbegoj kaj ĉefe antaŭ via ekrano en la reta mondo, vi povas multege kontribui al la Ago-Tago per disinformado pri Esperanto kaj pri la ideo de lingva kaj kultura diverseco pere de tiu mirinda komunikilo, kiu estas la reto. Ne gravas la medio, en kiu vi vivas, ĉiu medio estas grava por Esperanto.

Bonan Ago-Tagon al ĉiuj, kaj ĉefe al tiuj, kies ago-tagoj ĉiujare estas 365 (366 en la superjaroj).

Renato Corsetti
Universala Esperanto-Asocio

ARE – la plej bona sekreto

de D-ro Steven Brewer

One of the best-kept secrets in the world is the wonderful Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) – an autumn weekend in Esperantujo during the peak of the Northeastern fall coloration season, in 2005 between October 8 and 10 to be held at the Silver Bay YMCA conference center in Northeastern New York State. I moved to the Northeast in the mid 90's and missed the first couple of years, but since then, I have attended nearly every year.

ARE is one of the few truly international Esperanto events in the United States. I've attended many Esperanto events. The Landa Kongreso is probably next best, but it often has only a handful of international attendees. Organized by Normand Fleury and Zdravka Metz of the Quebec Esperanto Society over the past 12 years, ARE brings a large contingent from Canada and often has a handful of people from further away as well, especially from Central and South America, and sometimes even a few from North Carolina and other extremely foreign places.

Occasionally there has been a headliner – an important guest who comes to present and meet with everyone. Claude Piron came one year and Amanda Higley spoke another year about her epic voyage through Europe. Other notables include Marjorie Boulton and Boris Kolker. Most years there isn't anyone in particular – just the regulars plus a mix of new faces.

People begin trickling in on Saturday morning, renewing old friendships, meeting in small groups, and getting together for lunch. The weekend doesn't really start until the afternoon on Saturday, when the group comes together for Another Year in Esperantujo, an opportunity for anyone who travelled to an Esperanto congress to stand and speak for a few minutes on their experiences. Each year, people who have attended the Landa Kongreso, the Universala Kongreso, the TutAmerika Kongreso, and others around the world, stand up and share their experiences with the group: how they travelled, how they met with Esperantists, what was new, and what happened.

Saturday night is usually reserved for a variety of ice-breaker activities, so that people have an excuse to mingle, introduce themselves, and speak with one another. Each year, there is something new and fun to try. One year, each person had to wear a hat with the name of a famous sports figure affixed and ask questions of the audience to try to figure out who it was. I'll never forget the poor fellow from France who simply could not guess "Lance Armstrong" for anything. Starting in 2004, the Esperanto Society of New England offers a reception at the end of the evening with a formal welcome by a representative of the organization followed by light snacks and refreshments.



On Sunday, there are an assortment of activities for people to participate in: speeches, origami, nature hikes, writing haiku (I usually run that session), excursions, and anything else Esperantists are into. There is usually a book service set up where people can shop. For beginners, there are also Esperanto classes (that actually begin on Saturday and continue through the whole weekend). On Sunday night, there is a banquet followed by the "Kultura Vespero", where people present various kinds of theatrical, musical, or oratorical presentations. The haiku written during the afternoon session usually get read during this time.


On Monday, there are a few final meetings in the morning and a final get-together for a group picture, followed by lots of handshaking and hugs. For people who see each other for only one weekend a year, there are an awful lot of warm feelings. By noon, everyone is heading out, going back to their every day lives.

For the past 11 years, the meetings have taken place at Okemo Mountain Resort in Ludlow, Vermont. The organizers originally chose Okemo by drawing a line between Montreal and New York and between Ottawa and Boston – the line intersects right around Ludlow. The location had a lot of scenic beauty, but was sometimes short of institutional support for the meeting, being primarily a ski resort. Starting in 2005, ARE is committed to

trying new places. In the fall of 2005, the meeting will take place at the Silver Bay YMCA Conference and Training Center on the western shore of Lake George in northern New York State. In future years, it may try other settings including some proposed more urban locations.

Starting in 2004, a YahooGroups mailing list has been set up for people to participate in the organization of the event. Visit <http://groups.yahoo.com/group/auxtunarenkontigxo/> to subscribe and participate.

D-ro Steven Brewer



Nia prezidanto ĉe Better World Festival,
Saturday, June 18th, 2005, Northampton Fairgrounds

100 Jaroj de Internacia Teatro

de Bill Harris

Okazis lastatempe kurso pri teatraĵoj skribitaj originale en Esperanto dum la lastaj cent jaroj. La kurso estis parto de la ĉiujara NASK kursaro ĉe la Lernejo por Internacia Trejnado (angle: *School for International Training*) en Brattleboro, Vermonto, Usono. La trisemajna kursaro, kiu okazis en julio, konsistas el tri kursoj: komencanta, progresinta, kaj altnivela.

La altnivela kurso, gvidita de Paŭlo Gubbins, traktis naŭ teatraĵon. La plej frua estas monologo skribita en 1905 de Aŭgusto Baissac. La studentoj rol-provis ankaŭ verkojn de Roksano, Inglada, Adams, Baghy, Tabata, Boulton kaj Modest. Fine, ankoraŭ verkata teatraĵo de la instruisto mem estis diskutita.

La progresinta kurso estis gvidita de Birke Dockhorn, kiu estas profesia instruisto, loĝanta en Suda Koreio. Ŝia edzo, Bertilo Wennergren, vojaĝis kun ŝi, kaj estris kelkajn gramatikajn seminariojn dum la kursaro. Bertilo estas la aŭtoro de la interreta paĝaro Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Lee Miller gvidis la komencantan kurson, kaj samtempe organizis ĉion rilate al la instruado de la tuta kursaro.

La ĉefa celo de NASK estas levi la nivelon de esperanta kompetento en Usono, kaj la ĉeestado de eksterlandanoj ludas gravan rolon tiurilate. Ĉijare estis studentoj el Kanado, Aŭstralio, Nepalo, Makedonio, kaj Japanio.

La NASK-a sperto estis ege ĝuiga. Ĉiuj manĝis kune kaj sentis sin parto de eta Esperanto komunumo. Tim Westover plifortigis ĉi tiun komunan sperton per eldono de ciutaga novaĵletero (la NASKa Fasko), kaj per organizo de vesperaj programoj kaj semajnfinaj ekskursoj. Doktoroj Humphrey Tonkin kaj Duncan Charters vizitis kaj prelegis pri aktualaj Esperantaj agadoj en internacia aferoj. Apartajn dankojn al Ellen Eddy, kiu



zorge forglatisis multajn problemojn pri dormĉambroj, manĝkartoj, k.t.p.

ESNE gastigis akcepton ĉe la kursaro, kaj multaj ESNEanoj ĉeestis por renkontiĝi kun la NASKanoj. Ĉiuj manĝis frandaĵojn, trinkis vinon aŭ senalkoholaĵojn, ludis Skrablon (esperantan version) aŭ Go-on, kaj babilis diversteme.

Mi forte rekomendas, ke ĉiu esperantisto estontece partoprenu la kursaron. Mi speciale rekomendas ĝin al tiuj, kiuj finis komencantan kurson, kaj volas lerni plu.



Fotoj el la Someraj Eventoj

En la antaŭa numero de Verdaj Folioj, ni avertis vin pri la pluraj allogaj someraj eventoj en Esperantio. En tiu ĉi numero, raportas ESNA-anoj pri kelkaj. Jen interret-lokoj kie vi povos tra-rigardi fotojn el la Esperanto-eventoj.

La NASKa Fasko

<http://www.medialabinc.net/nask/2005/>

Landa Kongreso de ELNA

<http://kongreso.hewgill.com/galerio/>

Internacia Junulara Kongreso (IJK)

<http://tejo.org/ijk/2005/galerio/>

Universala Kongreso (UK)

<http://www.esperanto.lt/uk2005/index.html>

Kultura Esperanto Festivalo (KEF), UK, kaj aliaj

<http://www.aliaflanko.de/foto>

ESNE Has More Bookmarks!

de D-ro Steven Brewer

After the initial order ran out, we have replenished our stock of ESNE bookmarks with an additional order of 5000! The bookmarks are ideal to leave at libraries or bookstores. Contact Bill Harris <wb_harris (e) hotmail (punkto) com> to request some.

The bookmarks were proposed at the spring Jarkunveno and based on designs by Steve Brewer and David Wolff. The initial order was consumed in just a few weeks. Several people have described how easy it is to keep a few places stocked with bookmarks and the positive results of conversations with people started by dropped them off or having people picking them up.

If you think the bookmark project is worth supporting, please consider an additional donation to ESNE – \$10 will support the cost of 100 bookmarks. Send contributions to our treasurer Bob Lidral.

The front of the bookmark is shown here. The back contains more information. The complete design can be seen online at <http://esne.net/bookmarks.html>

Interesa Interreta Retejo:

*La Rido kaj Vervo de Raymond
Schwartz* (liaj vivo kaj verkoj)
<http://www.esperanto.cc/kabareto>

Learn to Speak



Esperanto

The International Language

Es•pe•ran•to (es' pe-rän'to) *n.* a planned language for international use, based on word roots common to the main ethnic languages.

You can learn Esperanto four times faster than other languages. Esperanto is the choice of millions who want to communicate with people all over the world.

For free information about Esperanto, contact your local Esperanto society. You can start here!

Esperanto Society of New England
<http://www.esne.net/>
esperanto@esne.net

Why Learn Esperanto?

Despite so many advances in communication, one great barrier remains: Language! You can help conquer it by learning Esperanto. Just imagine — What if everyone shared a common language...

Esperanto is fun! Whether you want to travel, correspond, meet people, or just learn a new language, Esperanto is a great choice. About two million people speak Esperanto world-wide — some in almost every country. Guides are available for people who want to correspond or travel using Esperanto.

Esperanto alone is both easy to learn and politically neutral. With a vocabulary borrowed from the common parts of many languages, Esperanto words are instantly familiar and easily remembered. Best of all, Esperanto contains none of the grammatical stumbling blocks you remember from other languages. With no exceptions or irregular verbs to remember, you can progress quickly to complete fluency.

ESNE Elections in May

Run for office and start your plans for world domination!

ESNE holds elections every two years; the next election will be in May 2006 with the results announced at the May Jarkunveno.

Start considering now if you'd like to run for one of the offices – even if someone else already holds that office. Maybe you think you can do better than the current officers or you think some of them need a vacation; maybe you're a masochist; maybe you're retired or unemployed and you need to keep busy or your spouse wants you to keep busy; maybe the judge wants you to do some community service... If the meetings are too far away from you, remember the president gets to pick meeting locations. Also, serving as an officer in such an august organization as ESNE looks great on a resume! Whatever the reason, competition is good and a contested election might be fun.

You don't need to be fluent in Esperanto to hold office, although it helps to know at least a little and you can learn more while in office. You must be a member of ESNE to run for office or to vote in the election so make sure your membership is up to date. Because ESNE covers such a wide geographic area, it helps to have an email account and access to the internet for communication with the other officers.

In addition to the general requirements for officers, the specific duties of each office is described in the ESNE Statuto as follows:

Prezidanto / President

The president shall preside over all meetings, lead the work of the other officers, and represent ESNA/ESNE officially.

Vic-prezidanto / Vice-president

The vice president shall substitute for the president when the president is unable to fulfill his or her duties.

Koresponda Sekretario / Corresponding Secretary

The corresponding secretary shall keep the minutes of each meeting, respond to written requests of the organization, and maintain the membership roster.

Eduka Sekretario / Education Secretary

The education secretary shall be responsible for lesson materials and other educational services for the members.


Redaktoro / Editor

The editor shall be responsible for the newsletter.

Kasisto / Treasurer

The treasurer shall accept all dues payments and shall produce a detailed financial report for each May [annual] meeting of ESNA/ESNE.

Please consider helping out with the club's work. If you have any specific questions about the duties of any of the offices, please ask.



National / International Events

Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)

Lake George, NY – Oct 8-10, 2005

For more information, see the article on ARE in this issue (page 8).

Internacia Seminario (IS)

Germany – Dec 27, 2005 – Jan 3, 2006

Popular annual international youth event on the scale of IJK.

<http://www.internacia-seminario.de>

Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK)

Davis, California – 24-26 March 2006

World Esperanto Convention / Universala Kongreso

Florence, Italy – July 29 - August 5, 2006

http://www.uea.org/kongresoj/uk_2006.html

World E-o Youth Convention / Internacia Junulara Kongreso

Sarajevo, Bosnia – Summer 2006

<http://www.tejo.org/ijk/>

Local Groups

A key goal of ESNE is to foster the creation of local Esperanto chapters. It's easy to set up and operate a local chapter – just choose a time and place and begin meeting! Advertise your local chapter here and on the ESNE website: <http://esne.net/chapters.php>

Acton, MA <http://www.panix.com/~dwolff/pizza.txt>
Esperanto get-togethers in Acton every Wednesday evening! They are informal, friendly, FREE, and easy to get to, near Routes 2, 27, and 111. We'd love to see some new people! 7-9pm at New London Style Pizza.

Amherst, MA <http://amherstesperanto.org/>
We have a weekly social hour, Wednesdays at 7pm, at Panera Bread (351 Russell Street in Hadley, near Walmart), to work through the Gerda Course and to practice speaking Esperanto. Join us!

Cambridge, MA
Boston-area Esperanto-speakers meet for lunch and conversation on the second Saturday of each month from 1-3pm at the Royal East Chinese Restaurant (782 Main St).

Cambridge, MA <http://web.mit.edu/esperanto/>
The MIT Societo por Esperanto, MIT's Esperanto Club, offers occasional courses and study groups.

Northampton, MA
Meets on Thursdays, 12-2pm in the Smith College Student Center. Contact Sally Lawton at (413) 527-3579 for more information.

Upcoming ESNE Events

October 8th – ARE Reception

Join us as the annual fall Esperanto gathering moves to Silver Bay YMCA Conference Center in Lake George, NY.

December 17th – Zamenhof Banquet

Plans are underway to have the ESNE Zamenhof Banquet in Amherst, MA, starting at 4pm on December 17th, 2005. We're planning to do a Stone Soup party, where each visitor brings something to contribute to a pot of soup that we can share. Other food contributions will be welcome as well. We also hope to have a theatrical presentation and other fun events. Please mark your calendars and look for further information in the coming months. We hope to see you there!